

O BRASIL ESPERANTISTA

ORGAO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 100-102 (386-388)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

Abril-Junho 1946

Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42.4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondukuponj.

COUTO FERNANDES



Ingeniero A. COUTO FERNANDES

Ĉi tiu numero de "O Brasil Esperantista" plenumas la doloran devon sciigi niajn samideanojn pri la morto de nia karmemora Dumviva Prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, Ing. Alberto Couto Fernandes, unu el la plej laboremaj esperantistoj en la mondo. Li mortis en la 22a de Aprilo kaj lia kadavro estis entombigata en la 23a. Multenombra akompanantaro estis formata ĉefe de esperantistoj kaj granda verda standardo envolvis la ĉerkon.

En la momento kiam la ĉerko envolvita en la standardo de Esperanto estis malsuprenironta en la tombon, la esperantisto Ismael Gomes Braga adiaŭis la mortinton en sia propra nomo kaj en nomo de la esperantista familio per jena parolado:

"Kara Samideano kaj Majstro Couto Fernandes.

Kortuŝite mi adiaŭas en mia propra

nomo kaj interpretante la senton de via granda esperantista familio.

En feliĉa edzeco dum kvindek unu jaroj, vi ne lasas infanon el via korpo, sed tre granda estas la nombro le la gefiloj, nepoj, pranepoj de via spirito; ja, tri generaciojn de esperantistoj vi preparis ne nur laŭ la scio de la belsona lingvo, sed ĉefe laŭ la interna ideo de nia sankta afero. Vi instruadis per vortoj, kiel profesoro, sed precipe vi gvidadis per ekzemploj kiel kredanto, kiel apostolo. Se la Esperanto-movado en nia Patrolando estas fervora kaj respektinda idealo, kiun ĉiu serioza homo ŝatas kaj atentis, tion ni ŝuldas al via pacienca dumviva penado.

Via scio de la lingvo estas granda, sed multe pli granda estas via amo al la nobla ideo de homa interkompreno kaj kunfratiĝo, al kiu kondukas la interna ideo de Esperanto. Vi ne nur amis kaj vivis tiun sanktan ideon, sed vi forte vivigis ĝin en la koroj de aliaj homoj per pacienca laborado de jardoj, tra tuta vivo de supera homo.

Per ekzemploj de sindonemo kaj silenta servado al la afero, vi fariĝis standardo por tri generacioj de idealistoj, kiujn antaŭ ol decidi ĉu fari aŭ ne fari ion, demandas instinkte al si mem: "Kion pri tio pensos Couto Fernandes?"

Vi neniam mortis por la esperantistoj, ĉar per viaj ekzemploj vi eterniĝis en la koro de ĉiu brazila samideano kaj la demando de konscienco por decidi pri ĉiu ago aŭ ne ago, malmulte ŝanĝiĝos. De nun ĉiu el ni demandas: "Kion pri tio pensos Couto Fernandes?"

Ni ja suferas pro la malapero de via korpo, ĉar ni jam ne povos je ĉiu momento telefoni al vi por peti konsilon

aŭ por anonci novan sukceson de nia movado. Ni jam ne havas vian patran aŭtoritatecon por nin gvidi kaj admoni por viaj sperto kaj prudenteco; sed ni ĉiam fieros, ke ni lernis el via saĝeco kaj ne facile eraros en nia longa vojo.

Ni bedaŭras vian malaperon, sed ni envias vian feliĉon, ĉar vi fidele plenumis en ĉiuj detaloj vian mision. Ja, Esperanto ne estas por vi simpla sciencavenko, triumfo de logiko, postulo de progreso; ĝi ŝvebas multe pli alte, kiel Dia inspiro, fako de la Religio, supera misio, kiun vi plenumis kun respektema fido kaj amanta koro. Sekve, en ĉi tiu lasta momento, ni devas gratuli vin kiel venkinton, triumfinton en la misio al vi donita de Dio. Ne multaj homoj fidele plenumas kiel vi sian mision ĝis la fino. Ricevu, do, nian gratulon kaj nian promeson, ke ni ĉiam penados imiti vian ekzemplon kaj akiri fidon.

Adiaŭ!"

Kaj tiam malaperis por ĉiam en la teron la korpo de tiu kara maljunulo, kiu dum sia vivo donis ĉiujn pensojn kaj sentojn al la afero de Esperanto en la Nova Mondo. Kiel Dumviva Prezidanto de B. L. E. li faris la plej rimarkindajn servojn dum jardekoj. En tiu ĉi numero de "O Brasil Esperantista" ni prezentas al niaj samideanoj en Esperanto kaj nacia lingvo plurajn aliajn informojn pri tiu vere eminenta gvidanto de nia nacia movado.

SOLENA KUNSIDO DE BRAZILA LIGO ESPERANTA

je honoro de ĝia karmemora Dumviva Prezidanto

Inĝ. Alberto Couto Fernandes, mortinta en la 22a de Aprilo 1946.

En la 29a de Junio 1946 efektiviĝis en la sidejo de Brazila Ligo Esperantista funebra kunveno por memori nian karan Samideanon Inĝ. A. Couto Fernandes, kiu de 1910 ĝis 1946 estis prezidanto de la brazila landasocio.

Ĉeestis multaj esperantistoj, amikoj, parencoj, vidvino Couto Fernandes kaj nia samideano D-ro Henrique Couto Fernandes, frato de la mortinto.

Malfermante la kunsidon kiel provizora prezidanto, D-ro Carlos Domingues, vicprezidanto de Brazila Ligo Esperantista, diris, ke la Ligo ekzistas deposed 1907a, kaj certe estas hodiaŭ la unua fojo, kiam ĝi kunvenas en la foresto de nia karega D-ro Couto Fer-

LA FORFLUGO DE L' AGLO

Al Couto Fernandes

Aglo ne falas; trafas nur la morto Kreitajojn rampantajn sur la tero. Estingiĝas brileto de fajrero, Eternaj de la sun' vivo kaj forto.

Aglo — flugas al luma nest' de l Vero, Abismo nigra — jen de l' verm la sorto! Vokas al si virtulojn Dia Vorto, Nekredantoj vagadas sen espero.

Se lin de l' Kred' animis sankta flamo, La fajro de l' Espero kaj de l' Amo, Ne ploru, do: li vivas, li batalas!

Senhalte, kun fervoro kaj obstino, La gloran vojon rektan de l' Destino Li sekvos ĉiam plu — agloj ne falas!

Rio, 23-5-46. — Porto Carreiro Neto

nandes. Nur la morto povis fari, ke li neĉeestu. Sed se ni lin ne vidas, ni sentas lin, tial ke ĉio en nia sidejo parolas pri li, en ĉio sin montras lia kvardekjara persista laboro — l'espero, l'obstino kaj la pacienco. Kiel fortanima batalanto li luktis ĝis la fino, kaj ni legas lian subskribon sur la registrlibro ankoraŭ en la 23a de marto.

Neniu alia faris tiom kaj tiel por Esperanto en Brazilo. Dum multaj jaroj la parolanto helpis lin, kaj eble pensis koni lian tutan agadon. Nun li konstatas, kian senmezuran laboron la prezidinto realigis, laboron nekonsatan, nerimarkitan, kiun li plenumis modeste kaj silente.

Lia korespondado estis grandega, ĉiu ricevis vorton de li, kaj post lia morto skribas al la Ligo pri li kiel pri intima amiko, kvankam multaj ne konis lin persone. La leteroj, kiujn la Ligo ricevas el la plej diversaj lokoj, estas kortuŝantaj pro sincera ĉagreno. Ĉiuj rekonas la altajn meritojn de tiu nobla civitano, kaj estas por ni honoro scii, ke la Nacia Konstituciiga Parlamento aprobis kondolencan voĉon pro la perdo de la amata estro de nia movado.

La prezidanto diras, ke li reprezentas tri grupojn:

La Sekretario de Grupo Esperantista de Baía, S-ro Hermes Pita, skribas: "Estas ja grandega bato, kiu plene trafis la koron de la Brazila Esperantistaro, postlasante ĉe ĝiaj vicoj malfacile plenigeblan vakon."

S-ro Ari Zamora, Prezidanto de Esperantista Societo de Pôrto-Alegre, diras en sia letero: "Tiu malĝoja novaĵo tre forte impresis min. Jam de 23 jaroj mi kutimiĝadis ricevi korespondadojn kaj konsilojn liajn, ĉiam li estis firme en la Esperanta posteno."

Jen vortoj de Grupo Esperantista de Santos, pere de ĝia Prezidanto, S-ro Lauro Jorge de Oliveira: "... tiu sindona idealisto lasis al ni ĉiuj belan ekzemplon, kiun ni klopodu sekvi."

D-ro Carlos Domingues tiel finis sian paroladon: "Antaŭ unu monato kun premata koro ni vidis nian majstron malsupreniri en la tombon; lia ĉerko estis kovrita per la verda standardo, la standardo, kiun tre alte li tenis. Couto Fernandes, kune kun Zamenhof, estos por ĉiam protektanta genio de la Esperanto-movado en nia lando."

Li invitis la Ĝeneralan Sekretarion por legi la korespondojn ricevitajn el diversaj lokoj de Brazilo kaj de aliaj landoj pri la morto de Couto Fernandes. La Sekretario legis ankaŭ kondolencojn de la Nacia Konstituciiga Parlamento kun subskribo de 20 Senatanoj kaj Deputitoj kaj unuanime aprobita de la Parlamento.

Poste parolis: la Ĉefdelegito de I. E. L., S-ro Antonio José Vaz.

En nomo de B. L. E. paroladis reprezentanto de la veteranoj, Prof. J. B. Melo e Sousa, reprezentanto de la junuloj, S-ro Sylla Chaves, kaj reprezentantino de la virinoj, F-ino Neusa da Silveira Muniz. Prof. Melo e Sousa parolis en nacia lingvo, rememorante la pionirajn laborojn de sia juneco apud Couto Fernandes, kiam Esperanto estis revo, utopio de kelkaj idealistoj.

Aliaj parolintoj estis: kiel reprezentanto de Esperanto-Klubo "Azeredo Coutinho" kaj Grupo Esperantista de Baturité, F-ino Maria do Amaral Malheiro;

En la nomo de Brazila Klubo "Esperanto", ties prezidanto, S-ro A. Caetano Coutinho;

D-ro Mário Ritter Nunes, reprezentanto de Esperantista Klubo de Florianópolis;

Prof. Roberto das Neves, reprezentanto de Esperanto-Klubo de la Asocio de Kristanaj Junuloj kaj de Senacieca Asocio Tutmonda;

S-ro Ismael Gomes Braga, reprezentanto de S. Paŭlo Esperanto-Klubo, Pernambuka Esperanto-Asocio, Esperanta Grupo de Barra Mansa, Esperanta Rondeto de Torquato Severo, Brazila Spiritisma Federacio;

S-ro Nelson P. de Sousa, en la nomo de Associação Esperantista do Rio de Janeiro.

Paroladis ankaŭ D-ro Taciano Acioli Monteiro, rememorante la tempon, kiam li mem kaj Couto Fernandes anigis al la Geografia Societo, kies direktoro dum multaj jaroj estis Couto Fernandes. Leŭtenanto João de Brito

Jorge menciis la patriotecon de Couto Fernandes, iama studento de la Milita Lernejo. S-ro V. Goianás de Sousa prezentis kondolencojn kaj sugestis ke la veteranoj de la Esperanto-Movado verku la Historion de Esperanto en Brazilo. Fine Prof. Everardo Backheuser paroladis en nacia lingvo pri la persono de Couto Fernandes, laŭ resumo, kiun ni presas en alia loko de tiu ĉi numero.

La Prezidanto de la kunveno, D-ro Carlos Domingues anoncis la morton de nia samideano D-ro Artur Lourenço de Araujo Primo, kiu eniris en la movadon samtempe kiam Couto Fernandes kaj multe laboris por nia afero en Ŝtato Espírito Santo, kie li mortis en la 4a de la nuna monato Junio. Post tiu sciigo, li dankis la ĉeestantojn, speciale la familion Couto Fernandes, kaj fermis la kunsidon.



Foto aspekto post la funebra kunsido je honoro de D-ro Couto Fernandes

PAROLADO DE S-ro. ANTÔNIO JOSÉ VAZ

S-ro. Prezidanto, karaj gesinjoroj, gesamideanoj:

Kiel ĉef delegito de la INTERNA CIA ESPERANTO-LIGO en Brazilo, mi ne povas silenti antaŭ la grava perdo suferita de nia esperanta movado, pro la morto de nia kara D-ro. Couto Fernandes.

Li multe faris por la diskonigado de la Internacia Esperanto-Ligo en nia patrulando. Mi povas eĉ aserti, sen timo erari, ke li sola pli multe faris, ol ni ĉiuj, en tiu sektoro. Kiel prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, li ĉiam estis la peranto kiu ricevis kotizojn, nomis delegitojn, disdonis membrkartojn, varbis novajn anojn, redaktis kaj sendis raportojn al "Esperanto Internacia", la oficiala organo de nia Ligo, pri nia enlanda movado.

Al li, Internacia Esperanto-Ligo, kies sidejo estas en Anglujo, sed, kies anaro troviĝas sur la tuta mondo, ŝuldas nesolveblan ŝuldon! Tial, ĝi tre bedaŭras la malaperon de sia granda amiko kaj samtempe sia neforgesebla kaj sindonema subtenanta membro!

Vera idealisto, dum multe da jaroj, li dissemadis la ĝermojn de la homa frateco, inter ni, pere de la mirinda kreitaĵo de nia majstro Zamenhof. Tamen, ni ĝoje devas konstati ke li ne vane semis, ĉar la fruktoj de lia senĉesa kaj utila laborado estas antaŭ ni.

Lia nomo estas vera standardo, kuniĝante la tutan brazilan esperantistaron, kaj alvokante nin por daŭrigi la belan entreprenon, al kiu li dediĉis sian

tutan vivon! Kaj mi estas certa ke lia alvoko estos aŭdata de ĉiuj kaj lia ekzemplo sekvota.

Lia korpo mortis, ni konsentas! Sed lia memoro vivos ĉiam en la koro de la tutmonda esperantistaro!

PAROLADO (resumo) DE D-ro. J. B. MELLO E SOUZA

Sinjorinoj, Sinjoroj, karaj samideanoj.

Al iuj homoj kiuj, pro siaj virtoj, sukcesis superi la komunan normon kiu karakterizas la homaron, la morto povas esti ankaŭ la finiĝo de batalo, sed ĝi estos certe la komenco de glorigo.

Tia estas, laŭ mia opinio, la signifo de ĉi-tiu omaĝo al memoro de Couto Fernandes, neforgesebla estro kaj amiko de l' brazila esperantistaro, nelacigebla batalanto.

Dum 40 jaroj li oferdonis al n'ia movado la tutan energion de sia eksterordinara personeco, kaj tiamaniere ni kutimiĝis al li, ke eĉ mi dubis ĉu ni povos daŭrigi la laboradon sen li.

Jen mi estas, karaj amikoj, plenumante doloran rememoran komision. Mi, do, alportas la kortuŝegan senton de l' plej malnovaj kunuloj, kunlaborantoj de Couto Fernandes dum la unuaj propagandaj jaroj.

Sendube, ĉar mia profesia misio konsistas en rememorigi senĉese la pasintcon, oni donis al mi la taskon reprezentanti en ĉi tiu solena kunsido la areton da songantoj, inter kiuj elstaris la figuro de Couto Fernandes, kiu sin trudis tuj al nia estimo kaj admirado, pro lia noblega karaktero kaj inteligenta ecaro.

Ha! tiu "malgranda rondo familia!" kia dolĉa kunvivado, kiaj ĉarmaj amikaj konversacioj, kiam ankoraŭ senspertaj, ni eklaboris, animataj de juneca ardo, fidante al graveco de nia afero, tenante nin kontraŭ la mokantoj, la kritikistaĉoj, la malkreduloj.

Mi bone memoras tiun tempon, niajn kunvenojn em mallarĝaj senkomfortaj ĉambroj. Kun entuziasmo preskaŭ infaneca, ni havis intereson elmontri, unu al la aliaj, niajn progresojn, niajn naivajn verkaĵojn esperantajn, niajn propagandajn projektojn, kaj eĉ la poŝkartojn ricevitaĵn de samideanoj el malproksimaj landoj. Tiurilate, ĉiu ei ni serĉis superi la aliajn, eltrovante samideanajn korespondantojn ĉe la plej strangaj regionoj de l' mondo.

Hernani Mendes, Nuno Baena, Alekso Fanzeres, Querino de Oliveira, karaj kunfratoj kiujn la morto jam forportis! kaj kiom da aliaj kiuj helpis nin, kaj ĉeestis niajn kunvenojn, kiel eble akurate!

La rememoro, la *saŭdado* pri tiu feliĉa tempo de miaj junulaj jaroj vidigas al miaj okuloj tiujn bonajn, bonegajn amikojn — Tribouillet, Honorio Leal, Lauriano das Trinas, Venancio Silva, aro da kleraj spiritoj, altiritaj de la beleco de nia idealo.

Feliĉe, flanke de junaj diligentaj samideanoj kiuj estas aliĝintaj al nia movado kaj al niaj asocioj, mi vidas ankaŭ ĉi tie — dank'al Dio! — kelkajn e'ementojn el la malnova gvardio esperantista.

Mi ne volas citi nomojn, por eviti fari nepardoneblajn mankojn.

Tamen mi petas permeson por fari nur unu escepton: mi menciu la nomon de nia karega Backheuser, kies viveca entuziasmo ne plimalgrandiĝis, malgraŭ

la forfluginta tempo, kiu neĝe ordamis lian blankiĝintan, respektigintan kapon.

PAROLADO DE S-ro SYLLA CHAVES

Kiel nova brazila esperantisto, mi parolos al vi pri granda brazilano, kiu ĵus mortis, Couto Fernandes.

Por ni li estas ekzemplo vere imitinda; dum lia tuta maljuneco li laboris por Esperanto, neniam laciĝante; sed li jam sciis, ke esperanto frukto-donos nur post lia morto. Nobla homo. Li laboris por ni, por la junularo, kiu vidos tion, kion li malfeliĉe ne povis vidi.

Esperanto estas savtabulo por la nova generacio, kiu tremas audinte paroli pri estonta milito, pri atoma milito, kiu povas unutage fini nian tutan civilizacion; nur esperanto povas unuigi la popolojn tiom, kiom estas necese, por ke la popoloj neniam, neniam plu militu. Se la popoloj denove militos, la tuta homaro tuj pereos, aŭ postvivos kelkaj homoj permane batalonte kontraŭ la bestoj, por ilin manĝi.

Ni, junaj, tute ne volas tion. Ni batalos por nia saviĝo. Esperanto jam ne estas nur bezono, ĝi estas nepra kondiĉo por ke ni ne pereu baldaŭ.

Apenaŭ per vera homara unueco ne estos nova milito; kaj por vera homara unueco esperanto estas necesa.

Couto Fernandes mortis, sed nia nuna generacio jam komprenas kaj neceson de esperanto.

Homoj mortas, homoj naskiĝas. Li mortis, sed ni povas diri, ke en la nova generacio iu lin anstataŭos, kvankam li estis preskaŭ neanstataŭebla. Tio estas nepre vera, mi scias, ĉar esperanto jam ne estas nur bezono, ĝi estas savilo.

PAROLADO DE FINO NEUSA DA SILVEIRA MUNIZ

Sinjoro Prezidanto, karaj samideaninoj kaj samideanoj:

Saluton!

Kiu el ni ne scias, kio estas Paco kaj kiel ege dolĉa kaj agrabla ĝi estas? — Paco! Celo pro kio estas batalintaj generacioj kaj generacioj dum jarmiloj. Tamen, al ni, kion sugestas la vorto "Paco"? Kiun imagon oni faras pri la plej bela kaj plena modelo de homa frateco? — La vorto mem montras al ni: Virinon! Kaj estas per malfortika virinvizaĝo ke oni prezentas al ni ĉi tiun homan kaj dian idealon.

Permesu al mi demandi. — kial Paco sugestas al ni virinan vizaĝon? Ĉar en ambaŭ estas multego da amo kaj kompreno. Ne estas eble ekzisti Paco, Frateco kaj Interkompreno inter popoloj se virino ne ekzistas. Ĉu ne estas virino la streko inter Dio kaj homoj?

— Nu! Esperanto estas unu el la ŝlosiloj kaj kredeble la plej valora el ili, por malfermi tiun ĉi grandan trezoron: "kuniĝo de ĉiuj homoj". De ĉiam Esperanto celas materialan kaj spiritan interkomunikadon inter ĉiuj homoj malgraŭ ilia diferenco de raso, religio kaj nacieco, Ĉu oni povus imagi tiel admirindan aferon sen la apogo kaj la interhelpo de la virino? — Ne!

Nia kara kaj neforgesebla Doktoro Couto Fernandes tre bone komprenis tion kaj dum sia tuta vivo, li laboris, batalis por Esperanto, kaj al ĝi, li ĉiam altiris la junulojn kaj nin — la virinojn de ĉiuj brazilaj ŝtatoj kaj de ĉiuj landoj. Li ĉiam klopodadis disvastigi inter ni, la ardan fidon, kiun li posedis en la idealo de la verda Stelo kaj li bone sukcesis!

Mi, kiel reprezentanto de la ina brazila esperantistaro, en la kunsido de Brazila Ligo Esperantista, farata memore de Doktoro Couto Fernandes, dankas al li la sinceran konfidon en efektiva internacia frateco, kiun li enfiksas en nian spiriton kaj en nian koron kaj, mi promesas ke ni ĉiam laboros por la bela idealo, kiun li tiel bone komprenis kaj amis.

Doktoro Couto Fernandes — via noblega Idealo ĉiam ricevos la apogon kaj la sindonemon de la Virino Esperantista.

PAROLADO DE FINO MARIA A. MALHEIRO

S-ro Prezidanto:

Kiel reprezentanto de Esperanto-Klubo "Azeredo Coutinho", en Belo Horizonte, Ŝtato Minas Gerais kaj de Verda Stelo Esperanta Grupo, en Baturité, Ŝtato Ceará, mi havas la honoron partopreni en la kunsido honore al la karmemoro de D-ro Alberto Couto Fernandes — pioniro kaj animo de la esperanta movado en Brazilo.

Al Brazila Ligo Esperantista, ilian respektoplenan ĉagrenesprimon pro la sentebla perdo de ĝia multmerita prezidanto.

Kaj mi mem, S-ro Prezidanto, tu-

tkore aliĝas al la saŭdadhono de Brazila Ligo Esperantista farata al nia tre kara kaj neforgebla instruisto, amiko kaj Majstro, kaj respekte riverencas lian memoron.

PAROLADO de S-ro. A. CAETANO COUTINHO, PREZIDANTO DE B. K. E.

Sinjoro Prezidanto, Sinjorinoj, Sinjoroj.

Brazila Klubo Esperanto elportis plej profundan baton pro la perdo de nia karmemora Alberto Couto Fernandes, unu el ĝiaj fondintoj, antaŭ kvardek jaroj, poste ĝia prezidanto kaj fine ĝia honora prezidanto.

Dum tiuj 40 longaj jaroj li faris ĉion eblan por la disvastiĝo de nia lingvo. en Brazilo, ne ŝparante fortojn kaj tempon, kaj rezervante al si, kontente, la plej lacigajn taskojn.

Jam de multaj jaroj li dividis sian tempon inter sia familio, siaj religiaj devoj kaj la Esperanta laborado.

Estas sciata, ke inter la esperantistaro, eĉ plej fervoraj samideanoj, kvankam tute ne forgesante kaj ne forlasante la genian kreaĵon de Zamenhof, tamen iafoje flankenmetas, pro diversaj motivoj, la esperantan movadon, almenaŭ kelkatempe.

Couto Fernandes, neniam; ne unu solan tagon li agis tiamaniere.

Lia dediĉo, lia sindonemo al Esperanto estis senkondiĉa, senrezerva, senmanka, absoluta.

Mi ankoraŭ memoras la unuan fondon kiam mi vidis lin, je la 21a de Aprilo 1911, post la solena meso kiu okazis en la ĉefpreĝejo de Juiz de Fora, dum la sukcesplena kvara Brazila Kongreso de Esperanto.

Post la belega, impresa prediko farita de Pastro Benedicto Marinho, mi prezentis min al S-ro Everardo Backheuser, kies distingiga figuro estis jam de mi konata nur portrete. Kaj tuj S-ro Backheuser samideane prezentis min al la tiutempe jam prezidanto de Brazila Ligo Esperantista. De tiam tago ni fariĝis amikoj, kaj ĝis lia morto regis ĉiam inter ni plena harmonio.

Por kontentigi lian deziron mi akceptis la prezidantecon de Brazila Klubo-Esperanto, kiun li ne ŝatis malpli ol Brazilian Ligon Esperantistan.

Jen kial, hodiaŭ, en la nomo de Brazila Klubo "Esperanto", mi devas eldiri kelkajn vortojn, honore al la memoro de nia eminenta, neforgesebla mentoro kaj estro.

Ĉar li bone meritis la dankon de la esperantistaro por ĉio kion li faris,

la plibona por ĝin montri estas daŭrigi lian laboradon. Pri tio oportuna estas la penso kiu apartenas al Diesterweg: "Oni dankas al la mortintoj tiel, ke oni akcelas la ideojn de ilia vivo; ke oni daŭrigas kion ili komencis; ke oni efektivigas kion ili volis".

PAROLADO DE D-ro MÁRIO RITTER NUNES

Kvankam nia ĉagreno pro la morto de nia neforgesebla Profesoro Couto Fernandes estas nesprimebla per parolo, tamen ĉi tie mi estas kiel reprezentanto de Esperantista Klubo de Florianópolis, por eldiri kortuŝitajn vortojn pri lia neforviŝebla memoro kaj atesti pri li nian sinceran dankon. nian grandan bedaŭron pro lia malapero.

Lia agado kiel esperantisto estis tiel granda, forta, neskeuebla; lia konduto kiel nia Prezidanto estis tiel sindona kaj idealisma, ke ni povas konsideri lin ankoraŭ kiel gvidanton de niaj laboroj kaj klopodoj, ĉar la tuta movado en nia Patrujo kaj la penso de ĉiuj brazilaj esperantistoj estas vivigitaj de lia apostola spirito, de lia neriproĉebla idealo kaj de la nobleco de liaj intencoj.

Liaj samideaj amikoj tre prave lin elektis por la alta ofico de Dumviva Prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, pro liaj sindonemo kaj persistemo en la gvidado de esperantismo en Brazilo. Ne nur dumvive, ĉar ankaŭ postmorte lia kara memoro daŭros gvidante nin, fortigante nin, por ke ni ne falu aŭ ne haltu antaŭ la baroj, kiujn la malico aŭ malklereco de la homoj kontraŭmetos al nia vojo de predikado por la kunfratiĝo de ĉiuj popoloj.

Lian pasintan persistemon ni benu, ĉar lian ekzemplon ni ĉiam havos por viviĝi nian fidon. Lia brava, nelacigebla laborado eĉ ĉiam en nia animo, kuraĝigante nin dum niaj embarasoj.

Samideanoj, se nin la morto falĉos dum la suprenirado — ĉar per laborado por Esperanto ni estas ĉiam suprenirantaj — kiel ĝi lin faligis, ni konsoligu antaŭsciante ke la postvivantoj, kiel nun okazas, estos justaj kontraŭ ni kaj benos niajn penojn por la paco de la homaro nekomprenata kaj nekomprenebla.

Multon li faris dum la vivado. Samtempe li gvidadis kaj instruadis. Dum lia instruado al lernantoj, neniam lin forlasis la elokventeco de l' scio, la beleco de l' sincero, la supereco de l' idealismo la pacienco de lia klopodado. Lia respektinda persono en nia sidejo



La estraro de B. L. E. en 1913. — J. B. Melo Souza, 1.^a sek.; inf.^o A. Couto Fernandes, prez.; d-ro E. Backheuser, hon. prez.; d-ro J. Keating, vicprez.; inf.^o H. Mota Mendes, 2a sekr. kaj E. Tribouillet, kasisto.

kaj ĉie estis voko al la junuloj por la plenumado de la devo. Li estis la idealisma forto en maljuneco kuraĝiganta la junularon. Benata ekzemplo li estis por ni! En la historio de Esperanto en Brazilo li plenigis epokon kaj malfermis luman vojon.

Sed la vivantaj lecionoj estis iam finiĝontaj kaj eble nedankemo aŭ forgesemo ne konservus ilian geniecon ĉe lernintoj kaj admirantoj por transdoni al la posteuloj. Por tion eviti, li eternigis en bonegaj libroj ĉion, kio plenigis lian cerbon riĉan je scio kaj lian koron pleneĝan de amo al la homoj.

Dumvive li multon faris. Laŭ trafa esprimo de l' eminenta Ĝenerala Sekretario de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, D-ro Teixeira de Freitas, rimarkinda laboro de Couto Fernandes estas, ke li fariĝis konektilo, ligilo inter Esperanto kaj Statistiko, t. e., inter Esperanto kaj ciferoj, du internaciaj lingvoj de la homoj. Nur tiu laboro sufiĉus por pravigi nian dankon al li por verko tiel grava, de tia praktika kaj profunda signifo.

Vi ja vidas, Samideanoj, ke la ekzistado de nia karmemora majstro estis fiero por liaj parencoj kaj amikoj, modelo de perfekteco por liaj lernantoj kaj apostolagado por la Patrujo kaj la Homaro.

Se tiel brila ja estis lia publika vivado, lia hejma ekzistado posedis la subliman virton de la sanktuloj kaj justuloj. Kiel edzo li estis modelo de familia virto. Mi konis lin en lia feliĉa hejmo kaj konstatis la perfektecon de lia granda koro.

Al la kara memoro de Profesoro Alberto Couto Fernandes, niaj samideanoj de Esperantista Klubo de Floria-

nópolis, kortuŝitaj, kvankam per mia malforta intelekto kaj neniel brila parolo, prezentas, la omaĝon de sincera, nedetruenda danko.

Ni ĉiuj ja por ĉiam perdis bonegan majstron, amikon kaj gvidanton. Al ni ŝajnas ke morto kaj gloro kuniĝis super lia tombo de nelacigebla batalanto; ŝajnas ja al ni, ke ni vidas cipresojn aliformiĝi je laŭrojn, en neeldirebla apoteozo de justeco, rememorado kaj eterna danko.

PAROLADO (RESUMO) DE. Sro. ROBERTO DAS NEVES

Oni petis al mi ke mi parolu ĉi-tie, en ĉi omaĝo al la memoro de nia kara samideano D-ro Couto Fernandes, kiel reprezentanto de la fremdlandaj esperantistoj. Tion mi ne faros, ĉar ne kiel esperantisto, nek kiel sennaciulo, mi min konsideras fremdlandano en iu ajn mondparto kie oni parolas Esperanton. Ne la nacia diverseco, sed nur la lingva malsameco distingas la homojn kaj ilin faras fremdaj unu la alian. Fizikaj landlimoj estas tute arbitraciaj, neniam produkto de la Naturo, kiu ne disigis siajn filojn. La solaj, la veraj landlimoj izolantaj la popolojn, estas la lingvodiversecoj, kiujn ni, esperantistoj, penas estingi por liberigi la homojn el la dia malbeno de la Babelturo. Do, se ni parolas saman lingvon, ni ne estas fremdlandaj unu rilate al la alia, kvankam vi naskiĝis en mondregiono nomata Brazilo, mi en mondregiono nomata Portugalujo, tiu en Germanujo aŭ Usono, ĉar ni parolantaj saman lingvon,

Esperanton, estas anoj de sama patrujo, tiu granda, vastega patrujo, pri kiu parolis nia komuna majstro: Esperantujo kiu ĉiam plu kaj plu, danke al la klopodoj de la fervoraj pacbatalantoj, kiuj ni estas, koincidas kun la tuta planedo nia. Resume, se mia patrino lingvo estas, kiel tiu de la plimulto el vi, la portugala, mia mensa, kora kaj plenaĝa idiomo estas nia kara Esperanto. Do, spite la diversecon de la politikpatrujoj, kie ĉiu el ni vidis unuafoje la taglumon, ni estas, danke al miraklo de Esperanto, sampatrujanoj.

Kvankam la socipolitika kaj filozofiaj nuancoj de D-ro Couto Fernandes ne estis precize la samaj kiel la miaj, mi ne rifuzas partopreni en omaĝo al lia memoro. Kontraŭe, mi tion faras tute volonte, kun la tuta admiro, kiun meritas la memoro de vera fervora idealisto, kiu oferis grandan parton de sia vivo por la alta idealo de homara fratiĝo. La kara idealo de komuna lingvo estis nia komuna idealo. Mi scias ke Esperanto ne estas panaceo, ke Esperanto, kiel iu ajn idiomo, povas esti instrumento por bonaj celoj, kiel por malbonaj. Sed D-ro Couto Fernandes, kiel vera idealisto, nur kulturis Esperanton, kiel pacigilon por la malpaciginta homaro, kvankam laŭ vojoj, miaopinie ne ĉiam kondukeblaj al tia celo.

Senreligiulo, mi ne praktikas la kulton al la mortintoj. Sed nia kara samideano Couto Fernandes ne mortis, almenaŭ tio lia, kiun hodiaŭ ni omaĝas ĉi-tie: lia spirito. Ĝi ŝvebas super ni kaj plenigas nian tutan medion, indikante al ni la vojon al la kompleta triumfo de nia komuna idealo: la tutmonda starigo de Esperanto. Ni aŭdu lian voĉon kaj ne ŝparu niajn klopodojn ĝis la definitiva triumfo de tutplaneda idiomo.

Finante: Mortis esperantisto! Do, vivu Esperanto!

PAROLADO DE Sro. ISMAEL GOMES BRAGA

Sinjorinoj, Fraŭlinoj, Sinjoroj,

Komisiita de Pernambuka Esperanto-Asocio, Sankta Paŭlo Esperanta Klubo, Esperanta Rondeto de Torquato Severo, Esperanta Grupo de Barra Mansa, mi devas kondolenci la esperantistojn pro la morto de nia karmemora Prezidinto Couto Fernandes.

Mia koncepto pri la malapero de Couto Fernandes por ĉiam el nia rondo ne estas tre klara. Post kvardekjara senĉesa kunlaborado, ni ne povas faci-

le kompreni ke ni neniam plu en la tuta eterneco retrovos la amikan samideanon por ricevi konsilojn, interkonsenti pri verkoj, projekti novajn laborojn. Pri lia malapero mia kapo estas ankoraŭ nun konfuza; mi estas konsertnita kaj ne scias kiel devas mi plenumi la ordonon de tiuj amikoj, kiuj nomis min por ilin reprezenti en la nuna funebra kunsido.

Nia juna, eminenta samideano Pastro Jozefo Nogueira Machado S. J., en konstanta korespondado kun Couto Fernandes kaj mi mem pri Esperantaj aferoj ofte diris, ke por lia Esperantismo Couto Fernandes estis avo, ĉar li lernis la lingvon el libroj de homoj, kiuj jam estas lernintaj de Couto Fernandes. Tial, kiam pastro Machado ricevis mian leteron pri la morto de Couto Fernandes, li skribis en versoj ke oni ne povas kredi je la morto, tio estas tento, Couto Fernandes revenis al la Kreinto. Jen la soneto:

LA AVETO MORTIS

(Al la Patro pri la morto de l'avo.)

Aveto mortis! Ploru, Verda Stelo, ĉirkaŭprenante lin per braka pinto en la malvarma ĉerko. Esperinto li estas. Estingigis la Kandelon.

Sed ne! For la tentaĉo! Al la celo, al la komenco, li, al la Kreinto revenis pace. Pli ol en estinto li helpas la frataron de l'ĉielo.

Leviĝu, Verda Stelo, el plorgemo. Alberto vivas. Flagru en kontento per b'ovo nun de pli favora vento.

Subtera korpo, mortis! — Ne. La semo, radika bazo kuŝos sub giganta Konstruo de Brazilo Esperanta.

Tiu juna kaj brava esperantisto ne konis persone la karan gvidanton de nia movado kaj tiu nekono estas por li granda bedaŭro. Denove li skribas:

LASTA NEPO AL LA MORTINTA AVO.

Aveto, mi nur ploras,
Ĉar mi ne povis vidi
Maljunan vizaĝeton
Paroli, tusi, ridi.

Mi estas tro infana,
Min naskis lasta horo,
Min vi neniam premis
Al Esperanta koro.

Aveto, kial Dio
Al mi ne donis sorton

Almenaŭ lastmomente
Ĉeesti vian morton?

La ĉerkon akompani
Tra la ĉefurbaj stratoj,
Paroli kaj kunplori
Kun la malĝojaj fratoj?

Aveto, miaj fratoj
Ne ĉesos min primoki,
Ne ĉesos miaj kuzoj
Min ŝerci kaj min voki:

“Infano! Jus veninta
En nian familion,
Aveton vi ne konis,
Valoras vi nenion!

En Esperanta lando
Novulo fremdoras.
Aveton vi ne konis,
Nenion vi valoras!”

Aveto, ne permesu
Malŝati la mokiton.
Ne vidis mi la korpon,
Sed sentis la spiriton.

Mi preĝas ke vi ĝuu
Feliĉe nian Dion
Kaj restu protektanta
La “grandan familion”.

Ja, por katolika pastro, kia estas tiu klera samideano, morto ne ekzistas. La korpo mortas, sed la animo postvivas kaj povas protekti kaj helpi nin vivantojn. Mi ankaŭ kredas tion kaj esperas, ke Couto Fernandes mortis nur por niaj sentumoj, sed li vivas por niaj spiritoj kaj restos ĉiam fidela al la granda ideo, kiu plenigis lian vivon.

Esperanto plenigis la koron kaj la cerbon de nia kara mortinto. Li ne vidis en Esperanto nur malvarman sciencan aferon, sed ion pli sanktan, pli proksiman de la religia idealo de tutmonda frateco.

Dum la lastaj jaroj de lia vivo, li laboradis kaj pensadis nur pri Esperanto, ĉar li estis pensiulo kaj ne pensis pri profesiaj laboroj. Tial li estis feliĉa, ĉar li posedis sian tutan tempon por la amata afero. Tio estis granda bono, sed en ĉio malbona estas io bona kaj kontraŭe: la malbona parto el tiu sindonemo estas jena: ni ĉiuj lasis al li la laboron kaj eĉ ne lernis mem labori por la afero. Nun lia morto devigas nin je longa kaj malfacila lernado de diversaj fakoj de la movado.

Mi ne intencas diri, ke ni ĉiuj ripozadis pro lia laboremo; ne, ni certe penis por kunlabori, ĉar restis kampoj liberaj. Kelkaj el ni aranĝis kunsidojn, aliaj gvidis kursojn, aliaj skribis por gazetoj, kelkaj eldonis librojn; sed

la oficiala laboro restis tutplene en la manoj de Couto Fernandes.

En la nuna momento, ni ĉiuj estas konsternitaj kaj demandas unu al alia, kion fari por anstataŭi la karan mortinton. Sed iom post iom D-ro Carlos Domingues prenas la fadenojn de la gvidado kaj la laboro rekomenciĝas.

Dum la lastaj semajnoj de la vivo de Couto Fernandes, li laboradis pacience kiel junulo en la preparado de poŝa vortaro, kiun ĉiuj esperantistoj bezonas. En tiu libreto aperos ĉiuj oficialaj radikoj de nia lingvo kaj ĉiu esperantisto devas ĝin havi ĉiam en la poŝo aŭ sur la skribotablo; tial la libreto estu tre malgranda, tre facile portebila. Por ĝin fari oportuna, oni mendis el Usono specialajn matricojn, kaj la kompostajn gvidis la kompilinto mem. Bedaŭrinde, la morto surprizis lin meze de la reviziado kaj nun D-ro Carlos Domingues reprenis la forlasitan taskon. Sekve, en tiu ĉi solena kunveno mi devas anonci al vi, ke la lastan laboron de Couto Fernandes vi ankoraŭ ne konas. Baldaŭ ĝi estos en viaj manoj kaj estos por vi memoraĵo pri la kara Samideano, kiun nur la morto haltigis. Tiu postmorta verko de Couto Fernandes atestos pri la pacenco kaj zorgemo de lia dumviva laborado por nia kara afero. Ties titolo estas *Dicionário de Bolso*, kaj per ĝi la instruisto de la oficialaj radikoj restos ĉiam kun ĉiu el vi tra la laudo. En tiu senco ankaŭ Couto Fernandes ne mortos, ĉar liaj verkoj konservos lin ĉiam ĉe la esperantistoj.

Couto Fernandes vivados ankaŭ per siaj ekzemploj. Li fariĝis enkorpiĝo, standardo de granda homama ideo kaj havis ĉiam la internan konvinkon ke tia ideo ne povas morti. En la plej malfacilaj tempoj, li konservis sian tutan fidon kaj pacience eltenis ĉiujn batojn. Nur superaj homoj estas ĉiam konsciaj pri la praveco de siaj idealoj kaj neniam deflankiĝas. Couto Fernandes estas simbolo de la ideo al kiu li servadis. La simpleco de lia karaktero, la pureco de liaj moralaj principoj, klare respiegulas la idealon de la esperantistoj.

PAROLADO DE S-ro. NELSON P. DE SOUZA

Komisiite de la prezidanto de Associação Esperantista do Rio de Janeiro, mi devas nun ĉi tie diri ion pri D-ro Couto Fernandes, la neforgesebla prezidanto de Brazilia Ligo Esperantista.

Kion povas mi aldoni al tiom kleraj paroloj kaj skriboj, jam diskonigitaj tra la tuta Brazilo kaj ĉe tra la tuta mondo? Tamen estas ankoraŭ io dirin-

da pri tiu kara samideano, kiu ĵus forlasis nian rondon. Mi devas nun reliefigi la senlacan helpadon de D-ro Couto Fernandes al nia Asocio, ekde ĝia fondo ĝis liaj lastaj tagoj. Mi ankoraŭ bone memoras, ke antaŭ kvar jaroj, k'iam ni ekkintencis fondi asocion en Rio de Janeiro, ni trovis ĉe li la plej grandan apogon kaj helpon; ni ĉiam havis antaŭ ni liajn saĝajn konsilojn, nin gvidante pri malfacilaj situacioj.

Al li ni ĉiuj ŝuldas grandan parton de niaj scioj, ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri ĝeneralaj aferoj ĉar de li ni ĉiam ricevis klerajn lecionojn.

Je la nomo de Associação Esperantista do Rio de Janeiro mi prezentas kondolencojn al la brazila esperantistaro, kaj mi certigas, ke honore je D-ro Couto Fernandes, ni ĉiam sekvados liajn klerajn kaj saĝajn konsilojn, kaj ni ne lasos lian ekzemplon vane perdiĝi.

PAROLADO DE D-ro EVERARDO BACKHEUSER

D-ro Everardo Backheuser parolis pri la "Personeco de Alberto Couto Fernandes."

Li klarigis ke la tipaj aspektoj de la personeco de Couto Fernandes povas esti deduktitaj, a priori, el liaj biotipologiaj karakterizaĵoj.

Liajn moralajn kaj temperamentajn trajtojn D-ro Backheuser difinis laŭ la sep jenaj paragrafoj:

1 — *Energio kaj decidemo:*

a) Li forlasis, deksepjara, sian naskiĝan ŝtaton (Maranhão), por studi ĉe Militista Lernejo en Rio de Janeiro.

b) Li aliĝis al la respublika propaganda movado, en 1889.

c) Li transiĝis en Politeknikan Lernejon.

d) Li fariĝis bata'anta esperantisto.

e) Li posedis proprajn opiniojn, kaj nefacile rezignis siajn vidpunktojn, se esencajn: *Suaviter in modo, fortiter in re.*

2 — *Inteligenteco kaj amo al studo:*

a) Distingiĝe aprobita en la 12 preparaj ekzamenoj por la Politeknika Lernejo, kie post brila studado li akiris la inĝenieran diplomon.

3 — *Persisteco:*

a) Senĉesa persistemo por propagandi Esperanton. D-ro Backheuser tiam mallonge priskribas la agadon de

Couto Fernandes, kiu estis unu el liaj unuaj varbitoj, okaze de lia kurso en gazeto "O Paiz" (1906).

Kunfondinto de Brazilia Klubo-Esperanto (1906), kies prezidanto li fariĝis en 1907, kaj de Brazilia Ligo Esperantista (21/7/1907); Prezidanto de B. L. E. (1910), poste ĉiam reelektita; fine, la 9a Brasila Kongreso de Esperanto o aklamis lin ĉiama, ĝismorte prezidanto de B. L. E.

Lingvo-komitato, li eksciĝis proprave, por ke estu elektita alia pli juna brazila samideano.

Konservativa, li estis ĉiam kontraŭa al gramatikaj ŝanĝoj kaj reformoj en la lingvo.

Li gvidis multajn kursojn esperantajn, dum 40 jaroj, instruante tri generaciojn.

Verkoj: Radikaro (Esperanto-portuga'a); Lernolibro (Kunlabore kun H. Motta Mendes); Vortaro portugala-esperanto (kun Carlos Domingues kaj L. Porto Carreiro Neto). Vortaro esperanto-portugala (kun Carlos Domingues).

Tradukoj: Amo per proverboj — komedio de Arthur Azevedo; Bahia, mia Bahia, de Pedro Calmon; O rádio em 16 pa'avras, de A. Aisberg, tradukita el la originalo esperanta; kaj aliaj verkoj en "Brazilia Esperantisto".

b) Li same tute sin fordonis al iu ajn afero al kiu li sin dediĉis: Skoltismo. Agado katolika," k. c.

4 — *Lojaleco kaj sindono:*

a) La konservativa spirito montras lojalan zorgon pri la aferoj kiujn li prenis sur sin.

b) Neprofitema a'douiteco (li ne ricevis aŭtorajn rajtojn de siaj verkoj).

c) Li tute fordonis sin al siaj aferoj.

d) Dum 30 jaroj li estis kasisto de Geografia Societo.

5 — *Modesteco:*

a) Nees'eca sin'eno, kvankam firma decidemo.

b) Li malebligis honorajojn al sia persono.

c) Li havigis al Esperanto grandajn favorojn, sed nenion por si mem.

6 — *Boneco* — Unu el liaj plej laŭdindaj kvalitoj.

a) Li parolis ko'ere senpacience al neniu.

b) Maljuste atakita en brazila esperanta gazeto, de kelkaj senskrupulaj samideanoj, li rebatis la atakojn noblemaniere.

7 — *Plenumo de la devo:*

a) Al lia familio: Modela tipo de edvo, de filo, de frato, dediĉo al liaj nevoj kaj aliaj parencoj.

b) Al Patrujo: Skrupulema zorgo en la tekuikaj kaj administraj oficoj kiujn li plenumis: distrikta ĉefo kaj teknika subdirektoro de Telegrafo Nacia Departamento, k. a.

c) Al la homaro: bonega amiko, esperantisto, karitata spirito.

d) Al Dio: forta religia sento kaj ekzakta obeo al kultaj ordonoj."

S-ro Backheuser finis sian elokventan paroladon, dirante: "Tiu ecaro igas kompreni la energian harditecon de lia karaktero, ĉirkaŭvolvitane per la mildeco de lia sinteno, kaj la konstanta delikateco de lia konduto.

Honori lian memoron estas amikeca devo, kaj ankaŭ eblo montri al liaj samtempuloj, kaj doni al la posteularo, imitinda modelon.

Medito pri lia vivo estas motivo pli grandigi ĉe ĉiu el ni la deziron plibonigi nian personan kaj socialan konduton."

Kaj tre emocie D-ro Backheuser proponis ke la ĉeestantaro levigu kaj staru silente dum unu minuto, je la honoro de la karmemora mortinto.

MORTINTA GVIDANTO

Valdemar Lopes

Tra la tuta Brazilo oni nepre legis, aŭdis, ke la Konstitucia Parlamento unuanime aprobis deklaron de sia bedaŭro pro la morto de Alberto Couto Fernandes; kaj multaj al si mem demandis, kiu estas tiu nekonato kaj kial tia omaĝo. Mi diros tamen al ili, ke li estis simpla kaj inda homo, posedanta iajn virtojn, kiaj ne ĉiam troviĝas en la homoj; ekzemple la virto posedi idealon. Tia virto donis al li la kuragon esti persistema, obstina, preskaŭ trudema, ĉiam, kiam li devis servi sian aferon, la aferon al kiu li sin donis dum sia tuta ekzistado.

Couto Fernandes estis homo je la servo de dialvoko; homo ĉiam ardanta por difinita celo. Mi estas konvinkita ke la aspirado al lingvo internacia malofte havis en la tuta mondo pli sinceran kaj sindoneman aposolon, de post la tempo, kiam en la mezo de la XVII jarcento Dalgarno eldonis sian sistemon de logika ordigado de la ideoj kunigitaj en ĉefaj klasoj ĝis la nuna provo de *Basic English*, kies taŭgeco, kiel jam demonstrite, kuŝas tre malproksime de la plena kontentigo.

Nenio nova estus memori, ke inter

unu kaj alia el tiuj projektoj, ĉirkaŭ kvindeko da provoj — por nur la plej gravajn mencii — signis la malkvietan serĉadon de l' homa intelekto por trovi universalan interkomprenilon. Sed el la proponitaj solvoj nur tri ja sin trudis kaj konsiderinde disvastigis, nome: *Solresol*, de Sudre, *Volapük*, de Schleyer, kaj *Esperanto*, de Zamenhof. Ĉefe ĉi tiu lasta, genia kreaĵo de kuracisto el Bialystok, per la simpleco de sia mekanismo kaj sia tute neŭtrala formado, kunigis elementojn kapablajn certigi la funkciadon de komuna helplingvo; ĉar ĝi ne malhelpas, tamen, ne tro favoras ekskluzive iun el la naciaj lingvoj, kies tradicio estas certa faktoro de firmeco kaj vivado de etnikaj homaj grupoj. Neniu pli bone ol Esperanto estas rekomendata por plenumi la malnovan deziron de Descartes, pri kiu Martin Du Gard atentigis nin en "Les Thibaults", aludante al "langue universale, fort aysée à apprendre, à prononcer et à écrire, et, ce qui est le principal, qui aideroit au jugement", (1). Tiu deziro estas tute kontraŭa al la vidpunkto de homoj, kiuj konsideras Esperanton sencelaĵo de kelkaj utopiistoj, juĝante laŭ la premiso, ke dum ekzistos la nunaj klasaj malsamecoj, la homoj des malpli komprenos unu alian ju pli ili parolos la saman lingvon.

Mi opinias, tamen, ke la plej granda eraro de tiuj, kiuj supozas senutila se ne eĉ ridinda la klopodadon por la disvastigo de Esperanto, kuŝas precize en falsa antaŭjuĝo pri ties celo. Ili supozas, ke ĝi intencas venki kaj anstataŭi la naciajn lingvojn, dum Esperanto celas nur nuligi la lingvajn barojn inter tiuj idiomoj etnikaj kaj okazigi simplajn kaj facilajn komunikaĵojn inter la popoloj de la plej diversaj lingvaj familioj.

Ne estas malplena aserto diri ke nun Esperanto estas unu el la plej grandaj moralaj fortoj je la servo de la homaj interfratiĝo kaj interkompreno, super la politikaj, etnikaj kaj religiaj antaŭjuĝoj. La komprenemo de tiu destino de Esperanto — kiel peranto, ne kiel celo — valorigis en miaj okuloj la klopodadon de Couto Fernandes, la esperantista gvidanto, kiun Brazilo nun perdas. Dum la lastaj ok jaroj mi atente akompanis lian agadon. La flamo de la homa solidareco gvidadis liajn agojn plenajn je sindonemo kaj persistemo; la koncepto de tutmonda frateco estis la plej forta impulso de la sentoj lin regantaj en batalo laŭ lia maniero.

Kiel gvidanto li valoris tutan legion. Li sola, vivante kaj servante sian ideon, sukcesis krei por ni escepte belan si-

tuacion en la Esperanto-movado de la tuta mondo. La historio de Esperanto en Brazilo estas plena je faktoj montrantaj miraklojn de lia persona agado. Mi menciu nur ion al mi raportitan kiam, post lia morto, mi portis al lia vidvino la numeron de *Revista Brasileira de Estatística* plej grandparte okupitan de la raporto pri la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, kies presprovaĵojn li reviziis, kelkajn tagojn antaŭ ol morti, kun tiu sama preskaŭ infana ĝojo per kiu li partoprenis ĉiujn venkojn de la Esperanta afero. Tiuj venkoj ofte konsistis nur en rekonto kun esperantistoj venintaj el la kvar anguloj de la mondo, el Hindujo, el Germanujo, el Aŭstralio, kaj kiuj tamen interparolis kaj interkomprenis kvazaŭ alia lingvo ne ekzistus, krom la helplingvo internacia.

Kiam la Ligo de Nacioj iam efektivigis tutmondan enketon pri la uzado de Esperanto kaj Brazilo prezentis la plej rimarkindan respondon laŭ nombro kaj kvalito de la opinioj: la Prezidanto de la Respubliko, ŝtataj Ministroj, Membroj de la Superega Juĝantaro kaj Akademianoj, ĉiuj klasoj, nia tuta eminentularo kultura — nenies subskribo forestis sur la dokumento, kiu ja ŝajnis esprimi de kolektiva animo, komuna vidpunkto de la tuta nacio; sed tiu dokumento montris precipe la agadon de unu sola homo, de Couto Fernandes. De homo kiu faris sian vivon apostolagadon kaj timis nenian sinoferon por servi sian idealon; li ne timis eĉ alfronti kaj venki la egoismon kaj malfavoron, dum malfacila klopodado malfermi vojon al la idealo, mezene nur de indiferenteco sed ankaŭ de malkomprenemo kaj moko de la homoj.

(El *Diário da Noite*, Recife, Pernambuco — Tradukis L. G. B.

(1) Tiuj vortoj en arkaika franca lingvo signifas: "tutmonda lingvo tre facila lerni, prononci kaj skribi, kaj, kio plej gravas kiu helpas la juĝkapablon". Tradukinto.

VIVO DE COUTO FERNANDES

Alberto Couto Fernandes naskiĝis en la 23a de Oktobro 1871 en S. Luiz, ĉefurbo de ŝtato Maranhão, Brazilo. Liaj gepatroj estis Francisco Fernandes Junior kaj Antônia Couto Fernandes. Lia brila kurso en *Liceu Maranhense* finiĝis en decembro 1888, kaj konsistis, laŭ la tiama instruprograme, en 12 lernoobjektoj, pri kiuj li estis plene aprobata. Tiam la 17-jara junulo translokiĝis en la tiaman Kortegon, Rio de Janeiro, kaj soldatiĝis por komenci en la 29a de Marto 1889 oficiran kurson en Militlernejo; en decembro de tiu sama jaro li estis nomata serĝento. Li estis unu el la subskribintoj de fama letero adresita al la revolucio

Benjamin Constant, kune kun 30 aliaj studentoj, en Oktobro de 1889, kaj en la 15a de Novembro li kun siaj kolegoj marŝis al la centro de la ĉefurbo por la revolucia movado, kiu eksigis la Imperiestron Petro la Dua kaj starigis Respublikon en Brazilo en tiu sama dato. Tiu revolucio estis tute sensanga, ĉar la Imperiestro kaj siaj fideluloj ne kontraŭstaris la revoluciojn gvidatajn de Marŝalo Deodoro da Fonseca.

Post la venko de la respublikanoj, Couto Fernandes forlasis la Militlernejon kaj enskribiĝis kiel studento en la Politeknika Lernejo de Rio de Janeiro, en 1891, en la kurso de konstrua inĝenierarto, kiun li finis en decembro de 1894.

Dum la jaroj 1891 kaj 1892 li laboris en oficejo de inĝenieroj kaj instruadis matematikon. La fama profesoro de algebro Francisco Ferreira Braga skribis pri Couto Fernandes la jenan laŭdon: "Mi deklaras, ke el la lernantoj ĝis hodiaŭ de mi ekzamenitaj, kiu plej grandajn montrojn donis de talento kaj admirindan lernadon en matematiko, tiu estis S-ro Alberto Couto Fernandes. Plie mi deklaras, ke la sama Sinjoro, en privata instruado pri aritmetiko, algebro kaj geometrio, estas montranta, laŭ la progresoj de siaj lernantoj, la plej evidentan kapablecon por la profesio de profesoro. — Federacia ĉefurbo, la 9an de Marto. — (Sub.) Francisco Ferreira Braga, profesoro de algebro en la Militlernejo de la ĉefurbo."

En la 16a de Marto 1893 li estis nomata unua klasa helpanto de la Komitato por Starigo de la Mapo de l' Bieno de la Federacia Distrikto, kaj tie oficis ĝis la 26a de Aprilo 1895, kiam li estis nomata helpanto inĝeniero de la Teknika Fakto de la Generala Oficejo de Telegrafoj. Poste, li estis Direktoro de la telegrafaj distriktoj de Rio de Janeiro, Maranhão kaj Bahia.

En la 20a de Junio 1900 li estis promo-

ciata je Distrikta Inĝenierestro kaj en la 6a de Aŭgusto 1903 li estis nomata kontisto de la Telegrafoj.

Per Dekreto de la 2-a de Januaro 1912 li estis nomata subdirektoro de Kontoj kaj per Dekreto de la 25 de Junio 1924, teknikaj subdirektoro, kaj restis en tiu ofico ĝis sia emeritiĝo en 1933.

Plurfoje li estis provizora direktoro de la Nacia Telegrafo kaj ricevis laŭdojn de Ministro Francisco Sá pro gravaj servoj al la publika administrado.

En la 7a de Februaro 1926 li ricevis la titolon Doktoro en Filozofio de la Fakultato de Filozofio de Rio de Janeiro.

Li estis kasisto kaj bonfarinta membro de Geografia Societo de Rio de Janeiro. Li havis gvidantajn postenojn en la katolika movado kaj estis membro de pluraj asocioj de bonfarado, ekviceprezidanto de la Brazila Katolika Unio kaj ties Konsilante; prezidanto de la Divizio de la Katolikaj Skoloj de Glória, Rio de Janeiro. Korespondanta membro de la Geografia kaj Historia Instituto de Stato Sankta Katarina, li estis nomata en la 15a de Aŭgusto 1916.

En la 15a de Junio 1923 liaj samŝtatanoj rekomendis al la Stata Registaro teni en la galerio de la Eminentaj Homoj, en la Stata Biblioteko de Maranhão, lian portreton.

Li senĉesa agado kiel esperantisto komenciĝis en 1906 kaj nur finiĝis pro la morto ¹⁹⁴⁶ Certe lia plej amata laboro estis por Esperanto, en kiu li ĉiam vidis unu el la plej gravaj venkoj de la homaro. Li senĉese gvidadis kursojn, estis prezidanto kaj poste honora prezidanto de Brazila Klubo "Esperanto"; prezidanto de Brazila Ligo Esperantista de 1910 ĝis sia morto; membro de la Lingva Komitato dum jaroj; membro de Amerika Esperanto-Akademio; prezidanto de la 2-a Brazila Kongreso de Es-

peranto kaj Honora Prezidanto de la 10a Kongreso; li preparis la *Radikaron* kun traduko en la portugala lingvo, ĝin trifoje eldonis kaj mortis dum la preparado de la kvara eldono. En kunlaborado kun aliaj Aŭtoroj li preparis diversajn librojn: *Gramática Elementar de Esperanto*, *Dicionário Português-Esperanto*, *Dicionário Esperanto-Português*. Bildaron por la Instruado de Esperanto, tradukon de la verko de E. Aisberg "Fine mi Komprenas la Radion!". Lia traduko de la komedio "Amo per Proverboj" havis du eldonojn, kaj ne estas eldonita lia traduko de la romano de Macedo "La Brunulineto". En la lastaj jaroj li tradukis la verkon de Pedro Calmon "Bahia, mia Bahia!" kaj la broŝuron "Urbo Salvador". Li estis ĉefa redaktoro de "O Brasil Esperantista", kunlaboranto en "Revista da Sociedade de Geografia" kaj "Revista Brasileira de Geografia e Estatística".

La aŭtorrajto pri liaj libroj estis ĉiam donacata al Brazila Ligo Esperantista por helpi la propagandon de Esperanto kaj pro donaco de tuta provizo de libroj li ricevis la titolon de Bonfarinto de B. L. E.

La ĉefrajto de la karaktero de Couto Fernandes estis persistemo. En favora aŭ malfavora tempo li ĉiam egale persistis en sia laboro por Esperanto. Dum lia lasta malsano, esperantistoj ĉiam vizitadis lin kaj li nur pensis kaj parolis pri necesaj laboroj, pri devoj plenumotaj.

Li postlasis vidvinon, S-inon Lisbela Luízia Perdigão Fernandes, sed ne infanon. Lia amata infanaro estis la junaj geesperantistoj de li varbitaj por la movado. Lia fervoro por la afero neniam malvarmiĝis ĝis la morto kaj lia seriozeco en la laboro estis ja imitanda ekzemplo. Dum aliaj samideanoj ofte plendas ke ili ne havas tempon por nia movado, Couto Fernandes povis prave diri, ke nia movado ne lasis al li tempon por aliaj laboroj.

Brazila Ligo Esperantista

Nova Estraro

La 29an de Junio okazis la ĝenerala kunveno de Liga Esperantista Brasileira, por elekti la novan estraron, sekve de la morto de ĝia Dumviva Prezidanto Inĝeniero Alberto Couto Fernandes.

Ĉeestis reprezentantoj de: Esperanto-Rondeto Torquato Severo; Esperantista Klubo de Florianópolis; Pernambuco Esperanto-Asocio; Esperanta Grupo de Barra-Mansa; Centro Esperantista de Juiz de Fora; Associação Esperantista do Rio de Janeiro; Esperantista Societo de Pôrto Alegre; Brazila Klubo Esperanto; Esperanto Klubo Azeredo Coutinho; Verda Stelo Esperanta Grupo; Grupo Esperantista Francisco Valdomiro Lorenz; Grupo Esperantista da Bahia; Centro Esperantista de Santos; São Paulo Esperanto Klubo; Centro Esperantista Granberriense; Esperantista Klubo São Jorge; Esperanto Klubo da Associação Cristã de Moços do Rio de Janeiro.

Jen la novaj komitatanoj elektitaj:

Prezidanto — D-ro Carlos Domingues
Vicprezidanto — S-ro Ismael Gomes Braga

Ĝenerala Sekretario — D-ro L. Pôrto Carreiro Neto

Unua Sekretario — D-ro Mario Ritter Nunes

Dua Sekretario — F-ino Iraní Baggi de Araujo

Kasisto — S-ro Délio Pereira de Sousa.

Tuj post la rezultato de la balotado, S-ro Generalo José A. Silveira Sobrinho, kiu prezidis la kunvenon, enoficigis ĉiujn estraranojn.

PROVA PRÁTICA DA NECESSIDADE DO ESPERANTO

"Franca Esperantisto" conta o seguinte:

Em fins de Setembro realizou-se em Paris uma conferência sindicalista mundial. Um pequeno incidente que nela se deu vem provar as complica-

ções resultantes da diversidade de línguas, em tais ocasiões.

"Le Peuple", órgão semanal da Confederação dos Sindicatos da França, em sua edição de 29 de Setembro de 1945, narra o que aconteceu durante a sexta reunião.

Presidiu-a o Sr. Hillman (norte-americano); falou em francês o Sr. Louis Saillant (francês). Durante sua oração, o Sr. Saillant foi interrompido por Sir Walter Citrine (inglês), falando em inglês, tendo sido traduzidas as palavras do Sr. Citrine para o francês, por um tradutor. Obrigado a resolver a controvérsia, o presidente Hillman declarou:

"E" para mim, muito difícil decidir a questão apresentada pelo Sr. Citrine porque não pude compreender as palavras do orador; Mas de modo geral tenho a impressão de que, etc..."

Depois de traduzidas estas palavras para a língua russa, o Sr. Saillant pôde afinal continuar seu discurso.

Não prova este incidente com força convincente, quanto seria útil o emprêgo do Esperanto em tais conferências?

BIBLIOGRAFIO

MI SERĈIS ORON KAJ OLEON
SED TROVIS...

De David Flood — Tradukis el la sveda Karl Gustafsson — Stelo Libro vol III Eldona Societo Esperanto. Fack 19071, Stockholm 19, Svedujo.

La aŭtoro, maskita en sveda provinco Vermlando, decidis, same kiel multaj junaj svedaj kaj svedinoj, foriri Amerikon, post la granda striko en 1909.

En Novjorko li laboris unue kiel telerpurigisto ĉe restoracio, kaj ŝokis lin la grandaj kontrastoj kiuj li konstatis dum promenoj sur la kvina Avenuo kaj kelkaj kvartaloj. "Ĉu li ne forlasis Svedlandon por veni for de socialaj maljustaĵoj?"

Tiam li decidis iri okcidenten, obeante la stratbaladon: "Go west, young man, go west."

En interesaj ĉapitroj Flood rakontas siajn aventurojn travivitajn en St. Louis, Kansas, en Lidsborg, kies fondon de svedoj, li priskribas, kaj pri la olekampoj en Oklahoma kaj Texas. "Jen venis la orfebro". Li klopodis partopreni la grandan orfosistan migradon al Red Lake, en Kanado, sed rane. Poste li iris al Great Bear Lake (Granda Ursolago), proksime de la Norda Glacia Maro, kie oni trovis radiumon.

Liaj renkontoj kun lupoj, ursoj, indianoj, gangsteroj estas agrable legindaj, en la bona esperanta traduko.

Fine li returnis al Svedlando, kontenta denove surtreti svedan teron, post dudekjara forestado. "Ĉiu en ĉi tiu mondo tamen estas relativa". Restis al li lia optimismo, kiel en lia junaĝo. Kaj li finas: "Estas iu dirinta: Ĉia prospero konsistas el tio, ke oni komencas kaj poste rekomencas denove."

PLI OL FANTAZIO

Tradukita el la dana lingvo de C. Traversen — 1946 — Dansk Esperantoförslag 3 danaj kronoj.

La verkistino de *Pli ol Fantazio* Agnes Bogh-Hogsted, malnova antikvistino, tre konata en Danujo konsistas tiu verko el kvin noveloj — Stina Karlsson, Fraŭlino Angelica Lovenfelt, Ĉifono-Soren, Nokta Flutmuziko, La desegnaĵo.

Ili pritraktas emociajn, kortuŝajn temojn; skribitaj en korekta stilo Esperanta, ilia legado estas agrablaj kaj rekomendinda al niaj samideanoj.

LONDONANIDOJ

De Donald W. Munns. The Esperanto Publishing Company Ltd. — Anglujo 1946. Broŝ. 2 ŝ, 6 p. Afranko 2p. Tiu verko, dediĉita al la geknaboj de Londono, estas skribita en Esperanto de knabo kiu havis nur 14 jarojn, kaj estis studinta hejme Esperanton dum 15 monatoj. Ĝi priskribas la vivadon de londonaj infanoj forsenditaj em kamparaj partoj de Britujo, en 1939, je la komenco de la milito.

Donald Munns mortis en Marto 1945, nur dekkvin jara.

Estas interesaj priskriboj pri ekzercaj bataloj, konkuradadoj kaj futbalaj ludoj, detale montritaj.

Nia juna samideano trafe uzis kelkajn kunmetitajn vortojn, ekzemple elurbigito, enomnibusigi, elomnibusigi, inecaĉulo, knabinecaĉeco, kontraŭknabinecaĉuloj, k. a.

"EN CINIO BATALANTA"

Ĉung-king, Majo 1945. 100 paĝa broŝuro enhavanta priskribojn interesajn pri la ĉinaj okazintaĵoj.

LA VIVO DE L'ESKIMOJ — Prof. Agostinho da Silva — Portugala Eldona Rondo — Monte da Lapa, 49 I. Pôrto, Portugalujo. Dua revizita eldono, traduko de nia samideano Manuel de Freitas. Ĝi estas la unua kajero de la serio "Ĉirkaŭ la Mondo".

LA KOMENCANTO — Eenvoudig Esperanto Leerboek — Door G. P. de Bruin-Amsterdam, 1945.

Nova lernolibro, donante en 26 lecionoj la plej necesajn kaj elementajn gramatikaĵojn por laboristaj kursoj en Nederlando.

Tiu bona lernolibro havas verkaĵojn kun kvanto da diversaj demandoj buŝe respondotaj, kiel materialon por paroli la lernantojn, dekomence.

"Pac-Planoj laŭ la Karto" (Peace Plans à la Carte) Odillo Wynner. — Separata de "Amerika Esperantisto".

"Problemas de base do Brasil" Excertos de um estudo elaborado pelo Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística.

AVO JOCO RIGARDAS — Ivan Vazov — El la bulgara lingvo tradukis Kr. Gerogiev. Havebla kontraŭ 3 resp. kuponoj. Bulgara Esperantista Asocio, Strato Gr. Ignatiev 2 Sofia, Bulgarujo.

Tiu rakonto estas unu el la ĉefverkoj de la bulgara popola verkisto Ivan Vazov. Ĝi priskribas la vivon de sepdekjarjara maljunulo, vivanta em montara vilaĝeto Balkana, en liberigita Bulgarujo, post la kvincentjara turka jugo.

NEKROLOGO

Fino Haidéia Ferreira

La 6an de Februaro lasta mortis en tiu ĉi urbo nia samideano Fino Haidéia Ferreira.

Ŝi estis urba instruistino, kaj ankaŭ instruis Esperanton, kiam funkciis kursoj de nia lingvo en la publikaj lernejoj de la Federacia Distrikto.

En 1921 ŝi ricevis post supera kurso kaj ekzameno la diplomon de profesoro aprobita.

"O Brasil Esperantista" rediras la kondolencojn jam prezentitajn de Brazila Ligo Esperantista al ŝia familio.

Fino Arlette de Vasconcelos Menezes

Fino Arlette de Vasconcelos Menezes, kiu antaŭ nelonge sekvis kursojn de Brazila Klubo "Esperanto", mortis la 6an de Aprilo lasta.

Brazila Ligo Esperantista sin reprezentis ĉe la funebra cerimonio realigita je la memoro de tiu fervora samideano, kaj kondolencis ŝian familion.

D-ro Artur Lourenço de Araujo Primo

Nia movado en Stato Espírito-Santo suferis grandan perdon pro la morto, la 4an de Majo lasta, de nia sindona samideano D-ro Artur Lourenço de Araujo Primo.

Li naskiĝis en la jaro 1872 en Stato Bahia kaj diplomigis en 1894 ĉe la Jura Fakultato de Recife.

Li okupis kun kompetenteco gravajn oficialajn postenojn kaj estis ano kaj prezidanto de Historia kaj Geografia Instituto de Espírito Santo.

Li emeritiĝis en 1940 kiel sekretario de la Apelacia Tribunalato de tiu Stato.

Lia agado por Esperanto speciale montriĝis dum la organizado kaj efektivigo de la VIII Brazila Kongreso de Esperanto, en 1926, en Vitória.

En la kunsido de Brazila Ligo Esperantista okazinta la 25an de Majo, la prezidanto diris laŭdajn parolojn pri tiu estimata samideano, kiu esperantiĝis samtempe kun nia karmemora Couto Fernandes. Krom tio, la Ligo estis reprezentita en la funebra ceremonio farita je lia memoro, kaj telegrafe kondolencis lian vidvinon kaj gefilojn.

D-ro Viterbo de Carvalho

En Itatiaia, Stato Rio-de-Janeiro, mortis la 31an de Majo lasta nia bona amiko kaj samideano D-ro Viterbo de Carvalho.

Militista inĝeniero kaj emerita kolonelo de la Nacia Armeo, li loĝis mul-

tajn jarojn en ŝtato Rio-Grande-do-Sul, kie li naskiĝis, kaj li multe agadis en la tiea esperantista movado.

Li verkis, sub la pseŭdonimo "Kverko", "Estudo do Esperanto", eldonitan en 1932 de Livraria do Globo, en Pôrto-Alegre.

Antaŭ kelkaj jaroj li translokiĝis al Rio-de-Janeiro, kie li okupis la oficon de direktoro de la Nacia Presejo. En tiu ofico li helpis al la presado de "Dicionário Português - Esperanto", aperinta en 1936.

Li estis prezidanto de la Organiza Komitato de la IX Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio-de-Janeiro en 1936.

"O Brasil Esperantista" kondolencas en la nomo de la anoj de Brazila Ligo Esperantista la familion de nia kara samideano.

H. J. Bulthuis

En la aĝo de 79 jaroj mortis la konata nederlanda esperantisto H. J. Bulthuis. Modesta, pacama, scienca, li malmulte parolis kaj multege laboris, laŭ diro de lia amiko dum pli ol 25 jaroj.

Liaj precipaj tradukoj Esperanten estas: "Jane Eyre", "Imperiestro kaj Galileano", "La Leono de Flandrujo", "la Malgranda Johano".

Li verkis ankaŭ originalajn romanojn: "La Vila Mano", "Idoj de Orfeo", "Jozefo kaj la Edzino de Potifar", "Infero" kaj aliaj verkoj.

Li estis unu el la unuaj Nederlandaj membroj de Lingva Komitato.

Pro la milito, li devis translokiĝi, kun sia edzino, el Hago al provinco Groningen, kie li vivis la lastajn jarojn en malagrablaj cirkonstancoj.

VETERANO?

El letero de S-ro George Saget, — 8, rue Guéret, Elbeuf (Seine-Inf.), Francujo —, kiun ricevis la prez. de BLE, ni ĉerpis la jenan pecon: "Vija konas la verketon "Veterano?..." de I. Gomes Braga. Por mi, ĝi estas kaj restas kuraĝo-instigan kunulo; al amikoj esperantistoj militkaptitaj en Germanujo mi sendis ekzempleron. Ĉiuj trovis en la legado de tiu libro esperon, fidon kaj kuraĝon... Eble, la aŭtoro ne scias plene pri la efiko de la verko... Tio estas bedaŭrinda. Por multaj francoj, la ekzempla vivo de S-ro I.G.B. estas imitinda. Mi mem estas esperantisto de 1903... Do, de pli ol 40 jaroj. Multon mi travivis en la esperanta vivo; sed ju pli mi maljuniĝas, des pli mi spertas kiel bela estas nia esperanta vivo..."

INTER VETERANOJ

Kara samcelano!

Foje vi tre lacigas, ĉu ne? Foje la batalado ŝajnas tro longa, preter viaj fortoj, la venko ankaŭ tro malproksima, ĉu ne? Kaj tiam vi emas demeti vian armilaron, transdoni ĝin al iu juna, pli nove alveninta, kaj vin retiri!

Kara fratribatalanto, mi havas bonegan konsilon por vi! En tia malluma horo vin turnu al "Vivo de Zamenhof", al liaj kongresaj alparoladoj, kaj tie, kiel ĉe pura reviviga fonto, trinku! Tiuj senpekaj aroj, tiuj belaj vortoj de genia sanktula karaktero refreŝigos vin. Denove, kiel antaŭe, vi estos konvinkita pri la nobleco, la sankteco de nia celo, denove vi komprenos la indecon de tio, kion ni faras por la homaro, kaj ekkriante: "Jes, ĝis la morto!", rekuraĝigite, vi reprenos viajn armilojn kaj rapidos al la plej antaŭa fronto de la batalolinio kie ankoraŭ nevenkita, flirtadas, esperigante, kondukante, la verda standardo, la stelo de la Espero!

"Antaŭen la malnova gvardio!"

("El Verdavalo" — n.º 3, Borneo)

LA SERVOJ DE ESPERANTO

El Helsingborg, Svedujo, S-ino Marta Kurvet skribis al la prezidanto de "S. Paulo Esperanta Klubo" leteron petantan, ke li eltrovu ŝian onklon. Jen peco el ŝia letero: "Mi min turnas al vi kun sincera, insista peto kunhelpi al mi eltrovi mian onklon, estonon Juhan Palkov, kies adreson ni, dum nia rifuĝo dum milito, perdis. Juhan Palkov devas loĝi en S. Paulo aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo. Mi estas estonino 22 jarojn aĝa, edziniginta. Antaŭ unu jaro kaj 4 monatoj mi rifuĝis el Estonio en malgranda boateto, kiam nia hejmo estis detruita de militistoj. Por ĉiu okazo mi jam nun aldonas letereton por mia onklo, kaj petas vin afable laŭeble tuj klopodi transsendi al li". 6-1-46.

S-ro Osvaldo Leite de Morais, prezidanto, tuj kontaktiĝis kun la estona konsulo, en S. Paulo, kaj petis lian helpon. Tiu ĉi vere interesiĝis pri la afero, sed, malgraŭ lia bonvolemece, oni ne eltrovi la deziratan adreson.

Tiam S-ro O. Morais presigis anoncon en ĉiuj lokaj ĵurnaloj kaj kun vera ĝojo li ricevis, post kelkaj tagoj, respondan leteron de S-ro Palkov, kiu nun laboras en la ŝtata ĉefurbo, kun peto pri tuja interrilato kun li.

S-ro Morais vizitis lin kaj transdonis al li la leteron de lia nevino. Li vere emocie tralegis ĝin, kaj tiel emociiĝis, ke larmoj elfluis el liaj okuloj.

CURSOS DE ESPERANTO

Realizam-se atualmente no Distrito Federal doze cursos de Esperanto, nos seguintes locais:

- 1 — Praça da República, 54 sob;
- 2 — Rua Arquias Cordeiro, 295-sob. — Meier;
- 3 — Rua Araujo Pôrto Alegre — Associação Cristã de Moços;
- 4 — Avenida Passos, 28-30-sob.;
- 5 — Rua Gustavo Riedel, 63 — Encantado;
- 6 — Rua dos Artistas, 151 — Aldeia Campista;
- 7 — Rua Leocádia Rêgo. 7 — Olaria;
- 8 — Rua Conselheiro Zenha, 31 — Tijuca;
- 9 — Rua Bambina, 136 — Botafogo;
- 10 — Estrada Nazaré, 748 — Anchieta;
- 11 — Rua Soares Meireles, 94 — Pilares;
- 12 — Associação do Banco do Brasil.

ANONCOJ

D-ro Lazaro A. Abranovič
Poŝtkesto n.º 71

IALTA — Krimeo
Dez. Kor. ĉiulande, ĉiuteme per il. p. letere; ŝanĝas fotojn, gazet.; certa respondo.

S-ro V. Zámostny
Palackého n.º 26

PRAHA XI — Ĉeĥoslovakujo
Interŝanĝas poŝtmarkojn de la tuta mondo laŭ la katalogoj aŭ laŭ la interkonsento. Ĉian demandon kaj proponon ni certe respondas.

Que é o Esperanto?

Propaganda broŝuro, en portugala kaj esperanta lingvoj aranĝita de B.L.E. kaj eldonita de B.I.G.S. Krom informoj pri la simpleco, facileco kaj oportunece de Esperanto, ĝi enhavas kelkajn poeziaĵojn, inkluzive 20 kvarversajojn de la brazila poeto Ademar Tavares kun ĝiaj respondaj tradukoj en Esperanto.

Prezo: Cr\$ 3,00

Speciala prezo por grupoj:

50 ekzempleroj — Cr\$ 100,00
100 " — Cr\$ 150,00

O Esperanto no Brasil

Broŝuro en portugala lingvo eldonita de B.I.G.S. por la propagando de Esperanto en Brazilo.

Prezo: Cr\$ 3,00

Speciala prezo por grupoj:

50 ekzempleroj — Cr\$ 100,00
100 " — Cr\$ 150,00

Tipoj kaj aspektoj de Brazilo:

Originaloj el la "Brazilia Revuo de Geografio" tradukitaj de sep membroj de B. L. E. eldonita de B. I. G. S. Formato 27 x 19. Ĝi enhavas 152 paĝojn kaj 36 ilustraĵojn.

Prezo:

Broŝurita	Cr\$ 20,00
Kartonita	Cr\$ 35,00
Bindita	Cr\$ 50,00

Eksterlande:

Broŝurita	16 respondkudonoj
Kartonita	30 "
Bindita	48 "

aŭ egalvaloro

Mendoj al BRAZILA LIGO ESPERANTO — Praça da República, 54
— Rio de Janeiro. Brazilo.

Livros em e sobre Esperanto

	Cr\$
Gramática Elementar de Esperanto, de A. Couto Fernandes e H. Mota Mendes	3
Exercício de Esperanto	1
Método de Esperanto, compilado por Ismael Gomes Braga	5
Esperanto-Modelo, livro de leitura, compilado por Ismael G. Braga	5
Chave do Esperanto, uma — Cr\$ 1 — dúzia	10
Curso Elementar de Esperanto, por Saldanha Carneira e Luzo Bemaldo	10
Dicionário Português-Esperanto, compilado por A. Couto Fernandes, Carlos Domingues e Luiz Pôrto Carreiro Neto, encadernado — Cr\$ 30,00 brochura	25
Dicionário Esperanto-Português, por A. Couto Fernandes e Carlos Domingues, encadernado	25
Karlo, facila legolibro, de Edmond Privat	3
Ilustrita Lernolibro de Esperanto, de D. Dalmau	5
Esperanto (Série Pedro II — Coleção B). Caderno para o ensino prático do Esperanto (Dúzia Cr\$ 25,00) — Um	3
Armea Terminaro, Aeronáutica Terminaro e Terminaro por Infan-ludoj, editados por IEL. Cada um — Cr\$ 3,00, coleção	8
Monumento de Carlo Bourlet	4
Veterano?, de Ismael G. Braga, encadernado — Cr\$ 7,00 brochura	5
Ano per Proverboj (Amor por Anexins), de Artur Azevedo, tradução de A. Couto Fernandes	2
O Rádio em 16 Palestras, de E. Aisberg, trad. de A. Couto Fernandes e Carlos Domingues (3. ^a edição)	15
La Vidvineto, romance de J. Alencar, traduzido pelo Dr. Luiz Pôrto Carreiro Neto	5
Diverskolora Bukedeto, poesias traduzidas de 40 línguas por Francisco Valdomiro Lorenz, encadernado — Cr\$ 12,00, brochura	8
Bhagavad-Gitá, do original em sanscrito, tradução em verso de Francisco Valdomiro Lorenz, encadernado — Cr\$ 12,00, brochura	8
"La Espero", hino esperantista, com música para piano	3

Encomendas à Brazilia Ligo Esperantista — Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. Os sócios da Liga teem direito a um abatimento de 10%. As importâncias inferiores a Cr\$ 20,00 devem ser acrescidas de 10% para o porte e registro.

Curso por correspondência, elementar	40
" " " superior	100

Peçam o Catálogo da Livraria da Federação E. Brasileira, à Avenida Passos, 30 — Rio de Janeiro

Karlo, de Edmond Privat
Facila legolibro por la lernado de Esperanto

Eldono de Brazilia Ligo Esperantista
— Praça da República, 54.
Rio de Janeiro

Prezo: Cr\$ 3,00

Speciala prezo por grupoj:

12 ekzempleroj — Cr\$ 30,00
25 " — Cr\$ 50,00

LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

PODEM SER ADQUIRIDOS NA

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

e nas seguintes livrarias:

Francisco Alves—Rua do Ouvidor, 166
Livraria da Boa Imprensa, Rua da
Assembléia, 35.

Livraria da Federação E. Brasileira —
Avenida Passos, 30.

PEÇAM CATÁLOGO

**Guia de Conversação Português
Esperanto**

e

Correspondência Comercial

Compilado por *Ismael Gomes Braga*

Editado pela LIVRARIA EDITORA DA FEDERAÇÃO E. BRASILEIRA — Av. Passos, 30. Rio-de-Janeiro — Preço Cr\$ 5,00

Livro indispensável a todo esperantista que deseja aperfeiçoar-se na conversação e correspondência com *sami-deanos* estrangeiros.

Presejo: **Irmãos Pongetti.**